# KATOLIKA SENTO

Jaro 55ª - 1976

2

KATOLIKA SENTO
n°2
55a Jaro Februaro 1976

# ĈIO KIEL ANTAŬE!

Ni devas peti de niaj legantoj pardonon, ĉar ni devas nuligi entute la decidon anoncitan en la januara numero pri nia provizora redaktado de la revuo Espero Katolika, kaj pri ĉiuj koneksaj proponoj: 4-paĝa redukto de Katolika Sento, ĝia aranĝo kun Espero Katolika , ĝia abonkotizo.

Do, ĉio daŭros kiel antaŭe.

Fakte, kiam ĉio estis ambaŭflanke plene fiksita, aperis neantaŭviditaj malfacilaĵoj, por kies solvo oni preferis atendi la decidojn de la elektota IKUE-prezidanto.

Ni, do, precizigas = Kotizo de Katolika Sento

| | | |
|---|---|---|
| por ĉi tiu jaro 1976, en Italujo | = | £. 1.500 |
| Aliĝo al UECI | = | £. 500 |
| Ekster Italujo | = | £. 2.000 |

Por ĉiuj aferoj kunligitaj kun IKUE kaj Espero Katolika, oni turniĝu prefere al S.ro Franco Galbusera; vic. Ghiacciaia, 6; 37100 Verona.

---

Pro la altigitaj kostoj de afrankado, de papero kaj de presado, ni kun sincera bedaŭro estos devigataj haltigi la sendadon de Katolika Sento al tiuj, kiuj ankoraŭ ne abonis ĝin. Ĉi tiu estos, do, la lasta numero,kiun

ni sendas al ili.
Sed, se iu volas ankoraŭ ĉi tiun revuon, li tuj bonvolu ordigi sian abonon, ĉar ekde la fino de marto ni ne plu rezervos ekzemplerojn senutilajn.

ABONIS KS-on 1976 (3a listo):

Aŭstrujo: J.Nagy; K.Dürrschmid; V.Sagan; Belgujo: L.Vertongen; E.Paesmans; Britujo: "The Brit.Esp.; L.Minio-Paluello; N.Vigar; Francujo: A.Augen; S. Opsomer; Germanujo: C.Malat; J.König; E.Stox; Hispanujo: A.Jimenez; KEHA; Hungarujo: B.Mihàlyi; Z. Makai; Italujo (Aosta): A.Cuaz; (Bari): K.Renschler; (Besana-MI): I.Gatti; (Bolonjo): I.Galletti; G.Gimelli; J.Balestrazzi; E.Grupo; (Cavalcaselle VR): G.Vandelli; (Cuneo): M.Mariano; (Brescia): B.Marinaro; E. Bordogna; (Ercolano NA): Rolando I.; (Fogliano GO): I.Pellis; (Ghilarza CG): E.Sias; (Ĝenovo): P.Rizzo; F.Bianchi; (Limbiate MI): M.Bollini; (Mantovo): D. Zacché; (Milano): E.Bongiorni; S.Giacchino-T.; G. Corrado; (Mirteto di Massa): P.Scortini; (Napolo): T. Restaino; E-Grupo Campano; (Reggio E.): V.Munarini; A.Fabbi; (Rimini FO): C.Boga, L.Scaparrotti; (Romo): A.Antonelli, F.Ragazzon, A.Biani; I.Galiardi; (Ruosina LU): F.Giannini; (Sciacca AG): F.Tulone; (Tirolo BZ): F.Knoflach; (Vercelli): M.Sola; L.Sola; G.Savoia; (Vicenza): J.Stocchiero; Jugoslavio: Z. Hag; L.Kiŝ; Pollando: J.Kos; T.Cudzik; I.Mikstein; I.Szanser; I.Piwowarski; J.S.Koza; S.Plachta; Z. Giedroyc-F.; M.Bienkowska; Z.Kwasniewska; Rumanio: J.Doboŝ. - Entute: 230

BONFARA KASO. - Kun plezuro ni konstatas, ke niaj ges-anoj ofte kaj volonte memoras pri nia B.K.,
En la ĵus pasinta jaro donacis monon: P.Pace, L.Senes, A.Menabene, R.Galeotti, O.Sias, T.Minjo -Pa

luello, E.Migliorini, N.N., G.Heimerl, A.Wollbacher E.Sias, E.Thiollière, E.Puracchio, E.Casagrande, M.Serratrice, M.Mariano, R.Skoruppa, G.Gimelli, A.Biani, A.Cuaz, L.Miccoli, G.Gatti, G.Stocchiero E.Stox, F.Knoflack, P.Dao - entute por £. 172.600.

Post partopreno en kelkaj karitataj aferoj, inter kiuj en la funebroj de Don F.Longoni, kaj en helpado al malriĉuloj konataj ĉe nia medio, restis ankoraŭ en la kaso £. 57.100.

Laŭdante la bonfarintojn, ni kuraĝas indiki ilian ekzemplon al multaj aliaj, kiuj same povos kun kristana sento kontribui.

KIEL ESTIS ANONCITE en la 1-a numero, je p.4, ni ekipis nian Roman C.O. de IKUE per telefona sekretario. Ĉiu povas voki ĝin laŭ ĉi tiu numero: (06)-75-88-388.
Ĝi anoncas sin mem per ĉi tiuj vortoj, post kiuj, vi tuj povas paroli:
"Ĉi tie la Centra Oficejo de IKUE.
Bonvolu deklari klarvoĉe vian nomon kaj mesaĝon en la esperanta lingvo aŭ en la itala. Vi disponas pri ĉirkaŭ 45 sekundoj".

..........

JE LA 19a FEBRUARO 1976 estos eldonita nova serio da Vatikanaj poŝtmarkoj pri aerpoŝto. La serio konsistas el tri nominalaj valoroj: £ 500, £ 1.000, £ 2.500, (entute £. 4.000) sur tri malsamaj desegnoj. La valoroj reproduktas figurojn de anĝeloj kaj beatuloj el la pentraĵo de la Universala Juĝo de Mikelanĝelo en la Siksta Kapelo.

— — —

ADMIRINDA ESTAS LA FERVORO de la katolikaj po - laj esperantistoj. Ili decidis eldoni ĉiumonate kontaktigan leteron "Nia Espero", kiu certe neniam estos malriĉa je informoj pri ilia aktiveco ĝenerale kaj aparte religia. Ĉi tio montriĝis precipe en la vigla kunveno de la Varsovia Katolika Intelektularo, gvidata de W. Tomaszewski kun helpo de sekr-ino I. Szanser, kaj partopreno de prof. Paruzel, sac. B. Ostropolski, s-ro St. Łotocki, kaj unue Episk. W. Miziolek. Grava iniciato estis la spiritaj ekzercoj por pastroj e-istaj en Niepokalanow, kiujn oni intencas ripeti ĉiujare post la plena sukceso atingita.
Same ĉiujare oni decidis pilgrimi al Częstochowa. Oni ne povas mencii la multajn aliajn projektojn kaj decidojn faritajn, kiuj pruvas la ekzemplodonan fervoron de la katolikaj polaj samideanoj.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## GRAVA AVERTO

La nova "Katolika Preĝaro" estas libro, kiun ĉiuj katolikaj esperantistoj devas posedi. Mendu tuj ĝin! (£. 1.000).

Kaj profitu de nia grava oferto por la verko "La Sklavoj de Dio" - 400 paĝoj - (£. 1.500 anstataŭ 2.700! )

Havebla de ni estas ankaŭ "Muzilo - Kajero n° 4", eldonita de prof. Henriko Paruzel, kun riĉa enhavo pri religiaj kantoj (vortoj kaj muziko). (£. 1.500).

Por poŝtaj afrankoj de ĉi tiuj libroj bv. aldoni £ 250, kaj por registrado en Italujo £. 250, ekster Italujo £. 350, laŭ la poŝta afrankado laste dekretita.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El la Katolika Eklezio

## VENU, NI PAROLU PRI DIO

La Vatikana Eldona Librejo ĵus publikigis la skribaĵojn kaj la paroladojn faritajn de la Sankta Patro en 1974-a, kiuj konsistigas la 12-an el la volumoj, kiuj, sub la komuna titolo Instruoj de Paŭlo VI, kolektas ĉiujare la koncernajn tekstojn de lia instruado voĉa kaj skriba.

De 1963-a ĝis 1967-a la tuta materialo en la volumoj estis dividita en tri aŭ kvar grandajn partojn, en kiuj la tekstoj estis arigitaj laŭ temo. Poste, oni preferis sekvi por ĉio la kronologian ordon, kia ajn estas la enhavo, kaj provizi la volumojn per indeksoj tre zorgaj, por faciligi la serĉadon de citaĵoj, de nomoj, de temoj.

De la 1-a de januaro ĝis la 29-a de decembro 1974-a Paŭlo VI plenumis sian taskon de instruanto, voĉe aŭ skribe, en 292 malsamaj okazoj, kaj iufoje por sama okazo li eĉ faris plurajn paroladojn. Ekzemple, dum la monato, en kiu disvolviĝis la 3-a Ĝenerala Asembleo de la Episkopa Sinodo, la Papo intervenis dek kvar fojojn; kaj kvin paroladojn li eldiris dum la preparo kaj la celebrado de Kristnasko. Konklude, dum 1974-a liaj instruoj havis oftecon preskaŭ ĉiutagan.

La tekstoj, kiuj en la volumo okupas 1363 paĝojn, troviĝas en la lingvo, en kiu ili estis diritaj aŭ skribitaj: itala, franca, angla, hispana, latina; de pluraj

estas aldonita la itallingva traduko.

Por havi entutan vidon, oni povas legi la tekstojn, kiel ili estas kunigitaj en kvin grupoj, laŭ simileco, en la analiza indekso: Paroladoj kaj Homilioj, Leteroj, Mesaĝoj, Tagmezaj admonoj, Telegramoj. La ekzamenado de ĉi tiuj titoloj prezentas preskaŭ la tutan instruadon de unu jaro, en sintezoj sugestiaj kaj plenaj de malkovroj; oni rimarkas, ekzemple, ke la Papo preterlasis neniun tagmezan rendevuon de preĝado: ĉiudimanĉe kaj okaze de eksterordinaraj festoj, la fenestro de lia studoĉambro malfermiĝis al Placo S.ta Petro por la patra renkontiĝo.

Kaj kiuj estis la celatoj de tia kaj tiom grava instruado? Kiaj estis la temoj regantaj kaj plej oftaj? Kiuj estas la ĉefaj instruantoj kaj inspirantoj?
Por respondi ĉi tiujn demandojn, treege utilaj estas la indeksoj, per kiuj estas provizita la volumo:la indekso de temoj kaj nomoj okupas pli ol cent dek paĝojn, kaj tiu biblia pliajn dek, dense presitajn.

La entenataj paroladoj kaj skribaĵoj estas adresitaj al la tuta mondo: al la homoj ĝenerale, aŭ al grandaj internaciaj Organizoj, kiaj estas la Tutmonda Konferenco por Nutrado, aŭ la instruantoj kaj aŭskultantoj de la Defenda Kolegio de NATO, aŭ UNESCO.

Iuj paroladoj turniĝas tute aparte al la politika mondo (kiel la respondo al la bondeziroj de la Diplomataro, kaj la bonveniga saluto al multaj novaj ambasadoroj).

Memkompreneble, la paroladoj specife religiaj konsistigas la pli grandan parton: iuj estas antaŭfiksitaj en la jara programo (festoj, solenaj liturgiaj periodoj, ĝeneralaj merkredaj aŭdiencoj); aliaj rilatas al apartaj okazoj (Kanonizadoj, akceptoj de specialaj grupoj ktp.).

Inter la temoj, superregas tiuj elektitaj por la du ĉefaj okazaĵoj de 1974-a: Renoviĝo kaj rekonkordiĝo por la Sankta Jaro, kaj Evangelizado por la 3-a Ĝenerala Asembleo de la Episkopa Sinodo.

La instruado pri Dio, pri Jesuo Kristo kaj Eŭkaristio, pri la Sankta Spirito insiste ripetas, ke Dio havas iniciaton: Li vokas kaj venas. Kaj, ĉe la alia flanko, la instruoj adresitaj al la homo lin instigas respondi al la vokanta Dio kaj iri renkonte al Li.

De tia ideo estas superregataj ne nur la grandaj doktrinaj temoj (kredo, konscienco, kristana vivo, sankteco, karitato, aŭ ilia malo: la peko, kiu estas ĝuste la rifuzo respondi al la dia iniciato), sed ankaŭ la admonoj al apartaj kategorioj de personoj (virinoj, junuloj), kaj la pritraktado de specifaj demandoj (geedziĝo, aborto: ĉi-lasta, pro premaj cirkonstancoj, estis ofta temo de instruado, tiel ke en la indekso neniu grava aspekto de la problemo estas neglektita). La temo plej elstara laŭ vasteco estas tiu pri la preĝado; kaj tio ne mirigas tiujn, kiuj memoras, ke jam de pluraj jaroj ĝi estas unu el la grandaj ciklaj instruoj de Paŭlo VI.

Al la evangelizado, alia ĉefa ideo de la instruoj de 1974-a, rilatas la "Apostola admono al la Episkoparo, al la klerikaro kaj al la fideluloj de la tuta mondo", pri la temo de rekonkordiĝo interne de la Eklezio, kiel celo de la Sankta Jaro. Kaj kun ĉi tiu teksto, kiu estas la plej grava, estas kunligita la instruado rilatanta al Bapto, Laikuloj, Ekumenismo, Apostoleco, Misioj, Liturgia vivo, kaj al la plej grandaj solenaĵoj: Kristnasko, Karesmo, Pasko.

Sub la titolo Mondo (konsistiganta tri paragrafojn en la indekso) montriĝas, ke la Eklezio vivas kaj agas en la mondo, en ĉi tiu nia tempo karakterizita per sia kulturo, per siaj grandaj problemoj por paco, justeco,

libereco, liberigo unuflanke, kaj alfabetigo, lernejo, laboro, malsato aliflanke. Neniu religia demando restas nekonata al ĉi tiu instruado, neniu homa suferado estas fremda por la zorgoj kaj maltrankviloj de la papa koro.

Multaj aliaj temoj meritus apartan mencion, sed tio postulus tro da spaco, kiun bedaŭrinde ni ne disponas. Tamen antaŭ ol fermi ĉi tiun skeman pritraktadon, ni volas esprimi nian miron pro la eksterordinara kono de Paŭlo 6-a pri nia tempo; kono, kiu aperas en la sinsekvo de liaj verkoj; kono realisma kaj amoplena, kiu ne kondamnas, sed instruas. Kaj en lia instruado plej multe mirigas nin, kiel precipaj karakterizaĵoj, lia forteco kaj lia kuraĝo, subtenataj de fundamenta optimismo.

tr. C. M -P. M.

TRE GRAVA DEKLARACIO estis publikigita tra la tuta Eklezio fare de la Sankta Kongregacio por Kredodoktrino je la 15a de januaro 1976. Ĝi pritraktas kelkajn seks-etikajn problemojn, pri kiuj nuntempe oni klopodas proklami kriteriojn kontraŭajn al la dia leĝo.

Ĉar efektive estiĝis ĉe multaj konsciencoj danĝera malcerteco, oni petis klarigojn de la eklezia doktrino.

Kvar estas la problemoj pritraktitaj en la dokumento: a) antaŭgeedziĝaj seksaj interrilatoj; b) samseksamo; c) la masturba problemo; ĉ) la realo de peko grava koncerne seksajn aferojn.

Per ĉi tiu dokumento la Eklezio admonas, ke "pri moralaj valoroj neniu povas arbitre konduti. Funde de konscienco malkaŝiĝas leĝo, kiun oni ne povas doni al si mem, kaj al kiu oni devas obei. La homo havas le-

ĝon, kiun Dio skribis en lia koro, kaj laŭ kiu la homo estos persone prijuĝata". Iom poste la Deklaracio aldonas, ke "la morala boneco de la agadoj apartenantaj al la geedza vivo, ne dependas nur de sincera intenco kaj de prijuĝo de motivoj, sed ankaŭ de objektivaj kriterioj deduktitaj el persono kaj ties agadoj, kiuj entenas la senton de reciproka donaco kaj de generado, interplektitaj kun la vera amo". La respekto de la seksagada celo estas garantio de ilia honesteco.

Laŭ ĉi tiuj kaj similaj konsideroj, la Deklaracio alpaŝas al la analizo de la kvar menciitaj punktoj.

1.- Antaŭgeedziĝaj seksaj interrilatoj. Multaj defendas rajton de tiuj interrilatoj, almenaŭ kiam ekzistas vera geedziĝa volo kaj kiam troviĝas en la gefianĉoj amo simila kelkmaniere al tiu, kiu estas en geedzoj. La Deklaracio malaprobas tian pensmanieron, kiel kontraŭan al la kristana doktrino, ĉar ĉiu seksagado devas esti kaj resti en la geedza sfero. La seksa kuniĝo respondos al la veraj postuloj de sia celeco kaj de homa digno, nur kiam la amo havas sian defendon en la stabileco de geedziĝo, kiu por la filoj de la Eklezio estas Krista sakramento.

Alia motivo de malaprobo kontraŭ tiu pensmaniero estas la jena: "La antaŭgeedzaj seksaj interrilatoj ekskludas plej ofte idaron; kaj tio, kio montriĝas geedza amo, ne povos evoluiĝi al patra aŭ patrina amo; aŭ, se eventuale tio okazas, tio estas kun danĝero al la filoj, kiuj ne ĝuos stabilan medion, en kiu ili povos konvene kreski".

2.- Samseksamo. Troviĝas iuj, kiuj pravigas tiujn interrilatojn, kiam temas pri "samseksamuloj, kiuj estas tiaj pro ia denaska instinkto aŭ pro patologia kondiĉo, kiun oni opinias nekuracebla". Sendepende de la komprenemo, per kiu oni devas helpi tiujn personojn,

por ke ili superu siajn malfacilaĵojn kaj sociajn kontraŭ-ajojn; sendepende de la prudento, per kiu oni devas juĝi ilian kulpecon, la Deklaracio solene asertas, ke "oni ne povas apogi paŝtistan sistemon, kiu pravigus moralan aprobon al tiuj agadoj... Laŭ la objektiva morala ordo la samseksaj interrilatoj estas agadoj senigitaj de sia esenca kaj nepra regulo, kaj en la Sankta Skribo ili estas kondamnitaj kiel moralaj devojiĝoj, kaj montrataj kiel bedaŭrinda sekvo de forneo kontraŭ Dio". Ĉi tiu prijuĝo fare de la Sankta Skribo, kvankam ne permesas konkludi, ke ĉiuj, kiuj suferas pro tiuj anomalioj estas persone plene respondaj pri la sekvaj agadoj, montras tamen, ke samseksaj interrilatoj estas esence malmoralaj kaj ke neniam ili povas esti aprobataj.

3.- La masturba problemo. Ofte nuntempe oni pridubas aŭ rifuzas decide la validecon de la eklezia instruo, kiu deklaras masturbadon grava morala misordo, pro la fakto, ke la memvola uzado de la seksa povo ekster la normalaj geedzaj interrilatoj, esence kontraŭdiras la celon de tiu povo, sendepende de la motivo, kiu provokas tiun agadon. Kelkaj pretendas pravigi masturbon, asertante ke, fakte, tio tre ofte okazas ĉe kelkaj popoloj aŭ homgrupoj. Sed la Deklaracio oportune admonas, ke "la kutima agado ne estas valida kriterio por juĝi pri valideco de homaj agadoj". La psikologio povas kelkmaniere helpi por konstati, ke nematuriĝo de la adoleskanteco aŭ psika malsekureco aŭ akiritaj kutimoj povas influi la konduton, malpliigante la volan karakteron kaj ebligante ke, en masturba agado, ne ĉiam estas peko konscie grava. Tamen oni ne rajtas aserti, laŭ ĝenerala regulo, ke masturbado estas ĉiam sen grava kulpo.

4.- Realo de peko grava koncerne seksajn aferojn. Multaj hodiaŭ neas la realon de peko grava. Laŭ ili o-

ni grave pekas nur kiam oni rifuzas rekte kaj formale la dian alvokon, aŭ kiam iu, pro egoismo sin fermas en tute kaj memvole al la proksimula amo. Ĉe aliaj kazoj ne ekzistus, laŭ tiuj opinioj, mortpeko, kaj precipe en la kampo de la seksa agado, kie, ĝenerale, iu ne rompas plene kaj konscie la moralan ordon, sed plejofte incitite de pasio, malforteco kaj senmatureco. Male, la Eklezio instruas, ke "mortpeko, kiu opozicias al Dio, ne konsistas en la nura malcedemo formala kaj kontraŭa al la karitata ordono; ekzistas ankaŭ tiuspeca opozicio al la aŭtentika amo, kiu inkluziviĝas en ĉiu memvola malobeo, pri grava materio, al ĉiu morala leĝo". Fakte, ĉar la "morala sekseca ordo kunportas por la homa vivo tiel altajn valorojn, ĉiu rekta malobeo kontraŭ tiu ordo estas objektive grava".

Al la seksordaj mankoj oni ne donas ofte konsenton entute liberan, kaj tiel necesas prudento en la kalkulo pri subjektiva respondeco de tiaj mankoj; sed admono al prudento tute ne signifas, kiel kelkaj pretendas, ke pri seksaj aferoj oni ne povas grave kulpi.

Ĉe la fino, la Deklaracio memorigas, ke ĉasteco estas multe pli ol nura pekevitado; ke ĝi devas esti travivata de ĉiuj kristanoj laŭ iliaj vivkondiĉoj kaj en ĉiu cirkonstanco de ilia ekzisto. Tiu, kiu sin allasas al malĉasteco, ofendas Kriston, kiu lin elaĉetis per sia sango kaj kies membro li estas, kaj la Sanktan Spiriton, kies same templo li estas.

Ĉiuj kristanoj povas esti helpataj por ĉasta vivo per sinkontrolo de sensoj kaj spirito, per prudenta evitado de pekallogoj, per gardo de pureco, per modero en amuzaĵoj, sindediĉo pri sanaj okupoj, per insista preĝado kaj ofta ricevado de la pentofara kaj eŭkaristia sakramentoj.

La Deklaracio finiĝas alvokante ankaŭ la civilajn

kaj ekleziajn aŭtoritatojn al ilia respondeco, por ke ĉiu laŭ sia respektiva agadsfero kaj povo ebligu defendon kaj progreson de la morala socia vivo.


Kiom estis dezirata ĉi tiu luma dokumento montriĝas el la kvazaŭ lavango da aprobaj leteroj, kiuj alvenas al la Papo ĉiutage de sennombraj civilaj kaj ekleziaj aŭtoritatoj, krom de multaj simplaj homoj, kiuj rigardis kun maltrankvilo kaj sufero la kreskantan agreson kontraŭ ĉiuj moralaj principoj, kiuj defendis ĝis nun personon, familion, socion. Legi tiujn konsiderojn en "L'Osservatore Romano", kiu preskaŭ ĉiutage dediĉas al ili plurajn kolumnojn, estus aldoni klarecon al la doktrino esprimita de la Eklezio. Sed ne mankis ankaŭ kelkaj, kiuj atakis la doktrinon de la Eklezio, kiel hipokritan, kiel mezepokan kaj taŭgan nur por maljunuloj, ktp. Pro tio ni volas citi simplan leteron de junulo, kiu sukcesis venki tiujn malfacilaĵojn en sia vivmedio.

"Mi estas junulo - skribas al la Prefekto de la S. Kongregacio por Kredodoktrino la aŭtoro de la letero - , kiu volas esprimi la ĝojon pro la Deklaracio pri kelkaj problemoj de seksmoralo.

Kiam vendrede mi aŭdis pri tio, mi komprenis, ke temas pri grava afero, dum la komentoj en nia medio estis tre malsamaj. Ĉiu estis influita de la amaskomunikiloj, per kiuj li estis informita pri la dokumento. Kiel katoliko mi petis de miaj amikoj kaj kolegoj iom da tempo por informiĝi rekte ĉe la fonto, sen iu partia komento; kaj tiel, apenaŭ estis eble, mi akiris ekzempleron de "L'Osservatore" kaj mi legis la integran tekston.

Mi vidis kiel la Eklezio estas por ni vera patrino kaj fariĝas pli kaj pli bela kaj inda je sia edzo: se ni, filoj ofte eraras, ĝi kuraĝas iri kontraŭflue; ame ĝi memorigas al ni la veron, la devon de nia vivo.

Antaŭ nelonge mi preskaŭ perdis fidon, preskaŭ mi



PAPO PAŬLO VI
Universala Paŝtisto de la Katolika Eklezio

opiniis, ke ne estas laŭhome kaj eble travivi seksecon konforme al la evangelio: preskaŭ senkonscie mi drivis laŭ la nehaltigebla fluo de la homa malforteco.

Sed nun la Eklezio montras al mi, ke ankaŭ en ĉi tiu kampo estas eble travivi fidele la evangelion. Kiom da paco kaj ĝojo donas al mi ĉi tio! Mi komprenis, ke la sankteco, al kio la Eklezio denove alvokas nin ĉiujn, ne konsistas en stato de perfekteco, sed en la plena konfido al la dia mizerikordo, eĉ se ni ĉiutage devas denove komenci. Ĉi tiu Deklaracio montris al mi la seksecon pli bela, pli libera, pli laŭhoma.

Se estas eble, bonvolu esprimi mian grandan, koran dankon al Lia Sankteca Moŝto!".

APOSTOLAJ MOVADOJ por familia spiriteco.

En la "Aktoj de la Katolika Nacia Renkontiĝo" pri la Eklezio en Hindujo, tiel estis anoncita la temo kaj la proponoj por progreso de la Familio: "Familia paŝtista agado devas celi, ke ĝi estu vere hejma Eklezio, komunumo karakterizita per kredo, preĝado, amo; aktiva pri evangelizado kaj katekizado, malfermita al aliaj familioj". Kaj inter la rekomendoj estis propono, por ke en ĉiu hinda diocezo oni estigu katolikan apostolan Movadon, kiu helpu la Eklezion por renovigo de la kristana spirito en la familio pere de pli aktiva partopreno de la gepatroj en la preparo de la filoj al la sakramentoj; por pli insista kaj memvola preĝado kaj legado de la Biblio; por spirito de servado kaj de ofero.

Pluraj kaj gravaj apostolaj Movadoj por kristana familia animado, aktivantaj vigle kaj kun frukto ĉe junaj Eklezioj, havas en sia baza programo, preĝadon en la familio kaj inter familioj. El la plej rimarkindaj, ni citas kelkajn, kiel ekzemplon: "Ekipo de Nia Sinjori-



ESFERANTISTA 25-PERSONA GRUFO

el Cavalcaselle (Verono), gvidata de sia Frezidanto D-ro Georgo Vandelli, venis kun granda entuziasmo al Ro

(v.je p. 43)

no", movado por geedza kaj familia spiriteco, fondita en Francujo en 1940 de p. Caffarel. Hodiaŭ ĝi nombras 20 mil parojn da geedzoj, ordigitaj laŭ 3.500 grupoj el 36 landoj. Ĉiu grupo konsistas el 4-7 geedzaj paroj, estas gvidata de respondeca paro elektita por unu jaro kaj estas asistata de spirita konsilanto. La membroj devontigas sin por spirita vivregulo, komuna preĝado almenaŭ unufoje ĉiutage, reekzameno de sia konduto ĉiun monaton, pristudo de monata temo kaj jara retiriĝo por almenaŭ 48 horoj.

La "Kristana Familia Movado" naskiĝinta en 1947 en Ĉikago kaj poste kunigita kun "Internacia Konfederacio de la Kristanaj Familiaj Movadoj", kunvenas ĉiujare, kaj en 1974 organizis kun la Tutmonda Konsilantaro de la Eklezioj, internacian renkontiĝon en Tanzanio. Ĝi havas kiel celon ebligi familian vivon entute homan kaj kristanan, ne nur interne de ĉiu familia medio, sed ankaŭ helpante aliajn familiojn atingi tiun proponon. Ĝi organiziĝas per grupoj de 5-6 familioj, prefere de la sama paroko, kiuj kuniĝas regule en la domo de unu el tiuj familioj. Ĉiu kunveno havas en sia programo preĝadon, mediton, informan raporton kaj socian enketon, finan preĝon kaj refreŝigan trinkaĵon.

Ĉirkaŭ la jaro 1945 estiĝis en Usono la "Movado Kana".

En Londono "Katolika Centro por geedza konsultado". Ĝi organizas porgeedzajn kursojn, favoras estigon de grupoj, celebradon de "Familiaj Tagoj", kaj kunvenojn, kiuj okazas laŭvice ĉe unu geedza paro.

"Geedza Renkontiĝo", fondita en Barcelono en 1962 zorge de P. G. Calvo kaj de geedza grupo, hodiaŭ estas disvastigita en 28 ŝtatoj. La unua tutmonda kunveno de la iniciatintoj okazis en Barcelono en 1973. La dua, dum la ĵus pasinta Sankta Jaro en Romo.

Kelkaj el ĉi tiuj movadoj jam ĉeestas kaj agadas en




ESPERANTO-EKSPOZICION

arangîs la tre vigla UECI-grupo "P.Carolfi" en Rimini dum la 25a Internacia Salono de Hotelekipaĵoj. Mul (v.je p. 43)

pluraj ŝtatoj de la Latina Ameriko, Azio, Afriko kaj Oceanio. En Aŭstralio, ekzemple, la "Ekipoj de Nia Sinjorino" komenciĝintaj en 1960, estas nun 55.

Krom ĉi tiuj, aliaj iniciatoj aktivas pli-malpli intense favore al la familio, kiel la "Katolika Agado de Familioj (Voltio, Kamerunio, Eburbordo, Beninio (eksDahomeo), Madagaskaro, Malio, Niĝerio); la "Legio de Maria"; la "Katolika Asocio de Familiaj Patroj", la "Katolika Asocio de Familiaj Patrinoj", la "Familia Savera Movado", la "Kristanismaj Kursoj", la "Movado de Novaj Familioj).

Estas interese rimarki, ke la familia preĝado kiun ĉi tiuj movadoj klopodas favori, perfekte konkordas kun la kutimoj de la tradicia Afrika familio. Inter la"Galloj" de Etiopio la preĝado adresita al Ĉielo-Dio aŭ al la Diino Atete, estas esence kolektiva. Ĝi estas esprimo de familio aŭ tribo, kiu estas gvidata respektive de la familia aŭ de la triba patro, por certigi pacon de la familio, ĝian fekundecon, ktp. Kaj ĉi tio estas komuna al multaj afrikaj popoloj.

Post la 2a Vatikana Koncilio iom post iom klariĝis pli vigla konscio pri graveco de la familio, kiel apostol-vartejo. Kaj la atentigo pri familia vivo intensiĝis per la publikigo de la encikliko "Humanae Vitae".

La Sankta Seĝo siaflanke interesiĝis aparte pri Familio dum ĉi tiu lasta tempo. En la Laika Konsilantaro (starigita de Paŭlo 6a je la sesa de januaro 1967) kreiĝis baldaŭ Komisiono: "Vivo de la Familio". Pluraj episkopaj Konferencoj estigis organizojn por enprofundigi la studon de la temo kaj de la familia paŝtisteco. Ankaŭ la Familiaj movadoj duobligis siajn apostolajn klopodojn, sed la plej grava signo de la paŝtista intereso de la Eklezio por la familio estis la kreo de "Porfamilia Komitato", fondita de Papo Paŭlo 6a je la 11a de januaro 1973, por pristudi la spiritajn, moralajn kaj so-

(el p. 39:)
mo ĉe la komenco de decembro, okaze de la Sankta Jaro.

Supre, en la foto: en la kunvenejo de la romaj katolikaj esperantistoj. Sube: antaŭ la Baziliko de S.Maria La Plej Granda.

Aplaŭdante la organizintojn de ĉi tiu memorinda renkontiĝo, ni deziras el ĝi la plej bonajn fruktojn. Fakte, tiuj renkontiĝoj inter grupoj de malsamaj urboj kaj eĉ pli, de malsamaj lingvoj, estas unu el la plej efikaj rimedoj por interkono kaj amikaj interrilatoj de samideanoj, kaj altiras viglan intereson al Esperanto.

(el p. 41:)
taj gesamideanoj ekzemplodone kunlaboris dum ĝia prestigo kaj por ilustrado al vizitantoj. Inter la plej altaj aŭtoritatoj, kiuj inaŭguris aŭ vizitis la Foiron, estis Hon. Angelo Salizzoni, vicsekretario de la Prezidanteco de la Ministra Konsilantaro. Ni vidas lin en la foto, parolanta kun pastro Duilio Magnani, inter p. Albino Ciccanti kaj la Sekretariino de la Grupo, s-ino Caterina Ceccarelli.

Ni gratulas la iniciatintojn pro la bela sukceso, premio de ilia laboro, ĉar la tre multaj personoj, precipe gestudentoj - rimarkinda grupo venis el la Respubliko San Marino - kiuj vizitis la Foiron, haltis ankaŭ en la stando de Esperanto, montrante grandan intereson pri la Internacia Lingvo.

ciajn problemojn de la familio laŭ paŝtista perspektivo. Kaj kvankam la Komitato estis devigita sin dediĉi kun aparta zorgo pri kelkaj specialaj problemoj, kiel nas - kiĝplanado, aborto ktp., aktualigitaj ĉefe pro celebrado de la Loĝantara Jaro, ĝi intencas koncentri siajn klopodojn por orienti kaj vigligi la animzorgon por la kristana familio, paŝtista agado, kiu celos starigi dialogon de familio kun Dio.

LA PLEJ ANTIKVA ESPRIMO de kulto al la kruco, trovîĝas verŝajne en Herkulano, la malgranda urbo situanta ĉe la piedo de vulkano Vezuvo, apud Napolo, iam somerrestadejo de riĉaj Romanoj. Herkulano estis sepultita dum la terura erupcio de Vezuvo en la jaro 79a post Kristo.

Diference de Pompejo, kiu post hazarda retrovo, povis esti iom facile reportita al la lumo, ĉar ĝi estis kovrita per kelkmetra cindrotavolo, Herculano, male, estis invadita de la vulkana lafo, kiu malvarmiĝinte, fariĝis tre malmola ŝtono. Plue, la inkandeska rivero karbigis la lignon kaj per sia enorma pezo ofte detruis murojn kaj domojn. Sed aliflanke ĝi povis gardi multajn objektojn, kiuj, sen ĝia defendo, estus por ĉiam malaperintaj.

Unu el ĉi tiuj, valora por la religia historio, estas kruco, aŭ pli precize, gipsa kava stampo de 47-centimetra kruco, en la centro de niĉa tabernaklo fermita per pordeto. Antaŭ la tabernaklo troviĝis ligna preĝbenko perfekta, kvankam entute karbigita. Temis, kiel oni tuj agnoskis, preskaŭ certe pri kristana familia preĝloko. Dank' al tiu malkovro, oni povas dedukti, ke jam antaŭ la jaro 79a, nome, ekde la unuaj tempoj de la apostola predikado, oni havas memoraĵojn de kristana

kulto en Herkulano. Tiel iu modesta hejmeto apartenin ta verŝajne,.. al fiŝkaptistoj, donis unu el la plej valoraj atestoj por la historio de la naskiĝanta eklezio. Ankaŭ pro tio, ke la signo de la kruco ne estis ĝis tiam populara. Oni prefere esprimis la kristanan kredon per la misteraj figuroj de fiŝo, panoj, ankro, kolombo. El la unua jarcento oni konas nur dudekon da krucekzempleroj, sed ili estas nur desegnoj aŭ pentraĵoj en katakomboj. La stampo de iu ligna kruco trovita en Herculano estas ne T-forma ("crux commissa" aŭ "patibulata"), kian uzis romanoj por sklavoj, sed la tradicia transversa: † ("immissa" aŭ "capitata") ĝuste kiel tiu kruco, sur kiu Jesuo eligis sian lastan spiron. Ankaŭ la pordeto, kiu fermis la niĉan panelon konfirmas tion, ĉar ĝi devis kaŝi tiun simbolon de religio, persekutata de la ŝtato, kiel superstiĉa, kaj primokata de la paganoj.

Oni ne devas forgesi ke komenciĝis tiutempe la plej kruelaj persekutadoj de Nerono kontraŭ la kristanoj, sekvataj poste de la pli vastaj, de Domiciano kaj Trajano; kaj ke la sekvantoj de la kruco estis montrataj kiel adorantoj de azeno. Jam Tacito mencias en siaj Historioj, la legendon de hebreoj, kiuj perdiĝintaj kaj soifantaj en dezerto, kaj savitaj de sovaĝaj azenoj, poste adoris tiujn bestojn. En 1857 en la Gelotia-loĝejo de la imperiestraj paĝioj de la Cezara palaco - oni trovis escepton dokumenton pri tio en desegno, reprezentanta krucumiton kun azena kapo, apud kio estas persono preĝanta; kaj surskribaĵo klarigas: "Alekzameno adoras sian Dion". La silueto, tutcerte desegnita de kamarado de kristana soldato, estas evidenta pruvo de la evangelia penetrado eĉ inter la imperiestra soldataro.

Pro la krucforma signo de Herkulano estas interese memori, ke ĝuste dum tiuj jaroj (62-65) la apostolo Paŭlo vizitis Romon kaj aliajn paganajn urbojn, kie lia pre

dikado lasis profundajn kaj daŭrajn spurojn.

KENJO. - KIENIO - De kelkaj jaroj Afriko komencis doni al la Eklezio siajn unuajn misiistojn. Freŝdate juna kenja studento Antono Ireri, post siaj votoj fariĝis membro de la Konsolitina Instituto. La ceremonio okazis en lia patra paroko de Kienio, plenplena de popolo. Ĉeestis la maljuna patro, ĝoja pro la donaco de sia filo al la Sinjoro kaj al misioj. La rito, kiu estis celebrita entute en la loka lingvo, estis aŭskultata kun emocio de la fideluloj, kiuj volis esprimi sian ĝojon kaj maturecon de sia kredo per dancoj, kantoj kaj porokazaj paroladoj, dum kiuj oni memorigis la vortojn prononcitajn de Paŭlo 6a en Kampalo en 1969: "Vi devas esti la misiistoj de vi mem!" La juna Antono Ireri estas la sesa afrikano de Kenjo, enirinta en la instituton de la Konsolitinaj Misiistoj aliaj junuloj kiel li sin pretigas por fariĝi baldaŭ misiistoj meze de siaj kunlandanoj mem.

KOMORA INSULARO. - MORONO. La katolika komunumo de la komora insularo en la hinda oceano, inter Mozambiko kaj Madagaskaro, konsistas el 2.500 fideluloj en loĝantaro de ĉ. 300.000 homoj, preskaŭ entute muzulmanoj. La eklezia personaro entenas 3 francajn kapucenojn kaj 4 religiulinojn de Nia Sinjorino de la Gracoj. Interalie ili posedas dispensarion kaj gvidas lernejon por katolikoj kaj muzulmanoj.

NAMIBIO. - MARIANNHILL - Nova preĝlibro en Zululingvo estis eldonita zorge de la Misia presaĵaro en Namibio (eks Sudokcidenta Afriko). La teksto enhavas, krom multaj preĝoj, ankaŭ mes- kaj rit-ordon de sakramentoj. La Zulua estas unu el la plej disvastigitaj lingvoj en Suda Afriko.

NIĜERIO. - ONITSHA - La episkopa konferenco de Niĝerio donis inviton al la landaj aŭtoritatoj, por ke oni entreprenu iniciatojn cele al defendo de mon-akirpovo, ĉefe precipe al la interesoj de malriĉuloj, kiuj ĉiam estas la unuaj, kiuj suferas pro senvaloriĝo de la mono. La lasta komuniko de la asembleo anoncas ankaŭ projekton por certigi al la sacerdotoj la necesan subtenon dum maljuneco; oni antaŭvidis, ke tiu projekto efektiviĝos en ĉiuj niĝeriaj diocezoj ekde ĉi tiu monato. En Niĝerio la plej malalta gajno de ne specialigita laboristo egalas nur 500 dolarojn dum unu jaro, kaj la lando, kies inflacia-grado atingas 15 procentojn, konas neniun soci-asekuran sistemon.

POLLANDO. La sacerdotaj vokiĝoj havas intensan ritmon en Pollando, laŭ la statistikoj publikigitaj pere de la Presagentejo de la Episkopa Konferenco. En la 27 superaj diocezaj seminarioj de la lando kaj en la religiaj superaj institutoj troviĝas 4.385 seminarianoj, nome, 3.120 diocezaj kaj 1265 religiaj.
La novaj sacerdotoj estas 606: 455 diocezaj kaj 151 el religiaj institutoj. 47 novaj sacerdotoj apartenas al Krakovo; 39 al Varsovio kaj samnombre al Tarnow; 36 al Katowice; 27 al Chelmno-Pelplin kaj 26 al Kielce;20 al Poznan. Inter la religiaj kongregacioj: 16 apartenas al la Patroj de la Resurekto.; 14 al la Salesaj,12 al la Minoraj Fratoj.
Katowice estas la diocezo, kiu havas la plej altan nombron da seminarianoj: 253; sekvas Tarnòw: 252; Krakovo: 227; Wroclaw: 205; Varsovio: 184; Opole kaj Przemysl resp. 177. Havas pli ol cent lernantojn: Chelmno-Pelplin, Czestochowa, Gniezno, Kielce, Lublino, Poznan kaj Warmia-Olsztyn. Inter la religiaj kongregacioj, unuaj estas la Patroj de la Dia Vorto: 134;poste la Minoraj: 128 kaj la Konventaj Fratoj: 68; la Sa-

lesaj: 87; la Palotanoj: 85; la Jezuitoj: 60; la Societo de Kristo: 67; la Misiistoj: 65 kaj la Oblatoj de la Senmakula Virgulino: 60. Kompare kun 1974 la vokiĝoj kreskis je pli;aj 169 instruatoj.

PORTUGALUJO. - La katolika radi-elsenda stacio"Renascenza" denove aktivas post naŭ monatoj de kontraŭleĝa okupacio. Je la unua de januaro, "Porpaça Tago", kard. Antonio Riberio, portugala patriarko, celebrante la meson en preĝejo S.Johano,proklamis tra la radio la neceson de la paco kaj ĝian konstruadon pere de la kristana amo: "paco ne stariĝas per malamo", kaj de "kunlaborado al justa kaj frata societo kun reciproka respekto, surbaze de rajto kaj justeco".

RODEZIO. - SALISBURRY. - El loĝantaro de 5 milionoj kaj duono da animoj, Rodezio havas preskaŭ 700000 katolikojn, el kiuj nur 40.000 ne afrikanojn, tio estas blankulojn, mulatojn aŭ azianojn. La klerikaro konsistas el 61 diocezaj sacerdotoj, el kiuj 14 ne afrikanoj; kaj 319 religiuloj, el kiuj 4 ne afrikanoj. Oni devas aldoni al tiuj 145 kunlaborantojn kaj 906 religiulinojn, kies duono estas aŭtoktonaj.

SOMALIO. - MOGADIŜO - Somalio fariĝis sendependa ŝtato ekde la 1-a de julio 1960. La Apostola Vikariejo de Mogadiŝo, nova diocezo, unika por la tuta nacia teritorio, havos sian katedralon en la plej grava ĉefurba preĝejo, dediĉita al la beata Virgulino Maria Konsolantino. Laŭ la lastaj statistikaj informoj, Somalio havas 4.000.000 da loĝantoj, laŭ 99 procentoj muzulmanaj, sed nur 3.100 katolikojn, kun 5 parokoj kaj deko da misiaj stacioj. 10 minoraj franciskanoj, helpataj de 62 fratinoj de la Konsolitino, zorgas pri ili.